

# La kristano sub la lupeo de la Biblio

(Prediko)

Estimataj gesinjoroj, estimataj gastoj, karaj gefratoj en Kristo,

ni ĉiuj scias, kiel kelkaj Esperantofunkciuloj emas mensogi pri la nombro kaj forto de la esperantistaro; ili parolas pri milionoj, kiujn la kasistoj de Esperanto-societoj, de UEA kaj aliaj organizaĵoj, de Esperanta Civito kaj speciale la redaktoroj de Esperantogazetaro kaj libroj neniam renkontis aŭ eĉ nur rimarkis ilian ekziston. Tio tre malutilas al la laboro de la esperantoj, ne nur ĉar la ekstera mondo tamen ne konsistas el centprocentaj idiotoj kaj ĝi iom post iom malkovras la trompon kaj pro ĝi definitive sin turnas de la entrepreno, kiu naive kredas akceli sian aferon helpe de mensogoj kaj trompoj, sed esence pro tio, ke mensogi estas granda peko kontraŭ la ĉielo kaj la afero, helpata de la mensogo, ne povas samtempe esti helpata de Dia beno. La fakturo, sendita de la ĉielo al la esperantistaro, jam delonge venis; nia afero stagnas kaj sur specialaj kampoj eĉ danĝere malkreskas, spite al la fakto, ke la ideo de la internacia neŭtrala lingvo logike, lingvistike kaj eĉ biblispirite estas senripoĉe ĝusta. Anstataŭ masoni sur la firma, solida roko de pura vero – kaj la Biblio diras al ni klaran vorton, kiu estas la vero en persono, Jesuo Kristo – nia kolegaro dum pli ol jarcento gaje masonis sur la marĉa kaj sablomova tereno de mensogoj, trompoj, fanfaronado kaj memprilaŭdado. La rezulto kuŝas antaŭ ni en sia tre klara demonstra lingvo de la faktoj.

Oni supozus kredi, ke eĉ pli ol la esperantistoj mensogas pri sia reala ekzisto kaj situacio la mondinfanoj, okupiĝantaj pri materiaj kaj financaj, pri politikaj kaj militistaj aferoj. Nu jes, ankaŭ ili emas mensogi, amase, tamen ili en tio ne estas la ĉampionoj. Iliaj mensogoj havas certajn limojn, ili estas la infanoj de la mondo, kiuj, kiel instruas al ni la Skribo, almenaŭ agas profesie, „*ĉar la filoj de ĉi tiu mondo estas en sia generacio pli prudentaj, ol la filoj de la lumo*” (Luk 16, 8). Politikisto, kiu mensogus draste kaj tuj evidente, ne havus ŝancon esti denove balotita, do li mensogas laŭmezure kaj fajne por ŝajni objektiva kaj modera. Sed troviĝas personoj kaj institucioj, kiuj mensogas vere senmezure kaj draste, transe de ĉio reale ebla eĉ en la okuloj de la plej fortaj utopiistoj kaj iluziistoj. Ĉu la poetoj, kiel akuzis jam Platono en sia Respubliko? Ne estas la poetoj, kvankam talentitaj mensoguloj. Ĉu la scenariistoj kaj reĝisoroj en filmoindustrio, kiel multaj kredas? Ho, ne mankas vere al ili emo kaj kapablo mensogi en mikso de fantazio kaj realo, sed ili estas puraj amatoroj kompare kun veraj gigantoj de la mensogado. Ĉu edzoj pri siaj edzinoj kaj inverse, edzinoj pri siaj edzoj, ĉu ili estas la pintaj majstroj de la fia arto, kies praktikantoj, kiel asertas la Skribo, suferos la eternan punon: „*Sed por la timemaj kaj nekredemaj kaj abomenindaj kaj mortigistoj kaj malĉastuloj kaj sorĉistoj kaj idolanoj kaj ĉiuj mensoguloj, ilia lotaĵo estos en la lago, brulanta per fajro kaj sulfuro; tio estas la dua morto*” (Apk 21, 8). Ne estas la edzoj kaj edzinoj, kiuj reciproke malvere parolas unu pri la alia, kvankam iliaj mensogoj ofte estas pli grandaj kaj pli danĝeraj ol la mensogoj, daŭre ripetataj en la parlamentoj de niaj respublikoj kaj en reĝaj konsilaroj de niaj reĝlandoj.

Estas la ekleziuloj kaj ekleziistoj, do la amatoraj kaj profesiaj reprezentantoj kaj gvidantoj de diversaj eklezioj, kiuj sin prenas por kristanaj, tamen senrajte, ja ilia bazo estas la malvero, la mensogo, multrilate, sed momente nin interesas nur unu faceto de ilia mensogado – la forto kaj la nombro de la kristanaro en nia mondo. Se oni malfermas ĉiujaran statistikon pri la monda loĝantaro, oni povas legi pri 2,1 miliardoj da homoj en la mondo, kiuj laŭserte estas kristanoj de la katolika (53 %), protestanta (16 %), ortodoksa (11 %), anglikana (3 %), biblia-libereklezia (0, ? %) kaj sekta specoj. Antaŭ ol eniri la teologian argumentadon kontraŭ tiu plej granda statistika blufado kaj mensogo, mi permesas al mi simple konstati, ke tiu ĉi statistika prezento klare kontraŭas la vortojn de Jesuo Kristo mem, kiu diris: „*Eniru tra la mallarĝa*

*pordo, ĉar larĝa estas la pordego kaj vasta estas la vojo kondukanta al la perejo, kaj malmultaj ĝin trovas*” (Mat 7, 13). Aŭ aliloke: „*Ĉar multaj estas vokitaj, sed malmultaj estas elektitaj*” (Mat 22, 14). Aŭ aliloke: „*Tamen kiam venos la Filo de homo, ĉu li trovos fidon sur la tero?*” (Luk 18, 8). Aŭ aliloke: „*Kaj iu diris al li: Sinjoro, ĉu malmultaj estas la savataj? Kaj li diris al ili: Strebu eniri tra la mallarĝa pordo; ĉar multaj, mi diras al vi, deziras eniri kaj ne povos*” (Luk 13, 23-24). Evidentas: la statistiko de Jesuo Kristo kaj la statistiko de la ekleziuloj ne estas la sama afero. Eĉ se ni ne komparas la eldiraĵojn de Jesuo, kiuj estas ne poeziaj metaforoj, sed tre klaraj asertoj, kun la raportoj de ekleziaj statistikoj, jam la stato de nia mondo parolas klaran tekston: se vere unu triono de la mondloĝantaro aŭ 80 % de la loĝantaro en la plej alte evoluitaj landoj de Eŭropo kaj Nordameriko vere estus kristanoj, kiu do aranĝis du mondmilitojn en la 20-a jarcento kaj iom post iom preparas tre verŝajne la trian? Se tiom da kristanoj, kiu aranĝas nian mondon tiom maljusta, mensoga, violenta kaj perversa?

Karaj amikoj, karaj gefratoj,  
antaŭ ol enketi en la Biblio, kiu vere povas esti nomata kristano kaj kiom da ili vivas sur nia planedo, kio estas nia hodiaŭa temo, mi volas montri unu el esencaj diferencoj inter la statistikaj kaj efektivaj kristanoj: la ŝajnaj parolas **pri** Jesuo – kaj la veraj parolas **kun** Jesuo, adresante al li siajn preĝojn! Mi invitas vin preĝi en la komuneco de preĝakordo kun mi kaj diri al nia Sinjoro sekvajn vortojn:

„Jesuo, nia Sinjoro! Mi kun granda ĝojo legas en la evangelio de via evangeliisto Johano, ke en la komenco estis la Vorto kaj la Vorto estis kun Dio kaj tiu Vorto mem estis Dio – kaj vi mem estas tiu eterna Vorto, estanta vera homo kaj vera Dio, per kiu kaj por kiu ĉio estiĝis, kio estis farita. Ni kunvenis en tiuj ĉi tagoj en la urbo Mariburgo, havanta du naciajn nomojn, la slovenan Maribor kaj la germanan Marburg an der Drau, pro nia speciala rilato al la vorto kaj al la vortoj, al maniero paroli, legi kaj skribi. Nia vorto, pro kiu ni kunvenis, en sia modesto ne estas komparebla kun la eterna Vorto, la sinonimo de vi mem, Jesuo Kristo, tamen ĝi rilatas al vi kiel ĉio, kio per via Vorto estiĝis. Nia rilato entenas ion specialan: la vidpunkton de justeco kaj serveco en la uzo de la vortoj kaj de iliaj kompleksaj sistemoj, la lingvoj. Por ni ne sufiĉas leksike kaj gramatike kompreni la parolon de la alia, kiel tion praktikas la ekstera mondo; ni deziras, ke tio okazu sub la kondiĉo de plena justeco kaj helpovola rilato de reciproka servado. Ni estas homoj, kiuj konscias pri la orgojlo en Babelo, kies sekvo laŭ la decido de via senfine justa Patro estas la lingva konfuzo, sub kiu la homaro suferas ĝis niaj tagoj. Ni konscias, ke tiu sekvo ne estas forigebla fare de la homa volo kaj agado, eĉ ne fare de la esperantoj. Sed ni legis vian vorton serve de la plumo de via apostolo Paŭlo en lia letero al Galatoj: *Reciproke subtenadu viajn ŝarĝojn, kaj tiamaniere plenumu la leĝon de Kristo*’ (Gal 6, 2). La lingva konfuzo babeldevena estas granda ŝarĝo, eĉ kaŭzanta paneojn kaj mortojn de multaj homoj. Dio ne malpermesis ĝin mildigi kaj plifaciligi, same kiel Li ne malpermesis medicinon kaj korpan helpon, spite al tio, ke Li instalas la morton kiel salajron de la peko kaj malsanon kaj aliajn plagojn kiel la sekvon de la origina peko de Adamo. Ĝuste kontraŭe, Dio ĝojas pro la homa interveno en la samaritana senco, vi mem, Jesuo, tion al ni rakontis, vi la unua tion plenumis. Sekve ankaŭ la provo plifaciligi la ŝarĝon de lingva konfuzo ne povas esti kontraŭ la Dia volo, ĝuste male, per la pentekosta miraklo en Jerusalemo la Sankta Spirito mem montris la vojon. La agado de esperantoj estas plene konforma al la pentekosta evento, kiam ne okazis la dominado de iu pli forta lingvo, kiel la latina aŭ la greka, sed okazis, unuafoje en la homa historio post Babelo, plena egalvaloro kaj egalrajto de ĉiuj lingvoj, kiel oni povas legi en la 2-a ĉapitro de la Agoj. Vi ankaŭ eldiris benon kaj feliĉproklamon al tiuj, kiuj laboras por la paco, kiel oni povas legi en la 9-a versiklo el la 5-a ĉapitro de evangelio laŭ Mateo: *Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj.*’ La kerna deziro de Zamenhof kaj de liaj lingvaj disĉiploj estis labori por la paco. Ne ĉiuj esperantoj komprenis, pri kia paco Jesuo parolis, sed la paco, kiun nur vi povas doni,

en la strebo de la esperantoj ne estis ekskludita. Eĉ sur la kruco, kie vi unufoje por ĉiam oferis vian korpon kaj sangon por la pardono de niaj pekoj, via Spirito inspiris eĉ viajn persekutistojn kaj mortkondamnintojn fiksi la surskribon pri via idento en nekomparebla egalvaloro kaj egalraĵo de tri lingvoj: la latina, la greka kaj via patrino, la aramea. Ĉio-ĉi estas la spirita bazo de nia kara lingvo Esperanto, vi mem starigis ĝin, tiel ni povas vin preni ankaŭ por nia unua samideano, ĉar via Spirito agis en la koro kaj menso de nia majstro Ludoviko Lazaro, kies nova lingvo estas nur la gramatikigo de via amo al la homoj, kiu tamen neniam aperas izola disde la absoluta justeco kaj vero. Ni preĝas al vi, nia majesta Savanto, benu nian laboron; faru, ke via biblia vorto trovu sian konvenan peran lingvon en la idiomo Zamenhofa – kaj ke tiu lingvo ne nur surpapere de la bibliotraduko, sed ankaŭ en niaj koroj kompletiĝu per la plej adekvata mesaĝenhavo, la Dia vorto mem, kiun vi senrezerve konfirmis kaj proklamis plenumota de vi mem. Benu nian kunvenon kaj niajn laboron, elsendu novajn invitojn por partopreni la nupton en la Regno de Dio ankaŭ en la lingvo, en kiu ni nun al vi preĝas.

Dum ni en tiu ĉi urbo diskutas pri lingva justeco kaj proponas nian modestan servon, ni aŭdas pri sufero de niaj gefratoj, kristanaj misiistoj en Afganio. Mi petas vin, Jesuo, rememoru vian preĝon desur la kruco, kiun vi motivigis per la nescio de la turmentistoj kaj mortigistoj. Havu mizerikordon kun niaj gefratoj, kiuj iris kuraĝe prediki vian nomon kaj vian evangelion – kaj havu mizerikordon kun iliaj turmentistoj, ja ankaŭ ili ne scias, kion ili faras. Faru, ke la sufero de la kristanoj el Koreio, kiuj volis plenumi vian taskigon fari ĉiujn popolojn viaj disĉiploj, en la ŝtonaj koroj de iliaj persekutistoj ekscitu sparkon de rekono kaj konvertiĝo, por ke viaj misiistoj estu savitaj de la surteraj suferoj kaj iliaj persekutintoj de la eternaj suferoj, se ili pereos, persekutante vian nomon. Amen.”

Karaj amikoj, gefratoj, ni kristanoj ne inventis nian eklezian identononon mem, la idolanoj ĝin unufoje uzis por marki niajn tiamajn samfidantojn en la urbo Antioĥio (Agoj 11, 26), tiama ĉefurbo de la roma provinco Sirio, nuntempe sub la turka nomo Antakya sudrande de Turkio. En la tie uzita greka lingvo ili nomis la adeptojn de Jesuo Kristo *christianói*, nialingve kristanoj. Romanoj ne kutimis vane diri „Nomen est omen” – la nomo estas la signifo. La nomo estas vera spirita karakterizo kaj programo, kiel oni povas vidi, analizante ĉiujn malnovtestamentajn bibliajn nomojn. Ankaŭ la nomo Jesuo havas konkretan signifon: Dio, kiu savas. Kristo, venanta el la greka vorto *christós*, ne estas vera nomo, sed titolo: la oleumita. La titolo de la reĝoj. Kristano do estas la homo, kiu apartenas al Kristo Jesuo, nia Savanto. Sed nia Sinjoro mem nin avertas, ne kredi al ĉiu, kiu sin kristano proklamas. Tiel li diras: „*Ne ĉiu, kiu diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la ĉielo; sed tiu, kiu plenumas la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo*” (Mat 7, 21). Nun ni venis al la kerna demando de nia temo: kiamaniere distingi la ŝajnajn, nur laŭnomajn „kristanojn” disde la veraj kristanoj, veraj postsekvantoj de Jesuo Kristo?

Antaŭ ol ni preĝis, mi jam citis unu el esencaj distingiloj inter la ŝajna kaj vera kristano: la falsa povas eĉ multe paroli pri Jesuo, pri Dio – sed nur la vera parolas **kun** Jesuo, kun Dio! Samstile mi povus citi la devizon de iu nordgermana kristana komunumo, kiun mi trovis en interreto: „La nurŝajnaj kristanoj faras la eklezion, frekventante la preĝejon – la veraj kristanoj **estas** la eklezio!” Tio ne signifas, ke veraj kristanoj daŭre restas hejme kaj ne kunvenas por kune adori Dion – ili nur konscias, ke ne tio jam faras ilin kristanoj, sed nur la persona rilato kun Jesuo Kristo, kiun iu homa institucio, eĉ la vera eklezio, ne povas anstataŭi. Nia demando estas: kiamaniere ni povas vere havi personan rilaton kun Jesuo, kiamaniere ni povas vere plenumi la volon de lia Patro, por ke ni povu nin preni por veraj kristanoj? Mi konscias, ke la nuntempaj eklezioj instruas la falsan doktrinon pri senlime amanta Dio, kiu finfine ĉiujn homojn savos kaj venigos en sian Regnon, ja cetere lia amo ne povus esti senfina kaj absoluta... Tio estas la homa, la humanisma saĝo, sed ne la saĝo de Dio! Ĉe Dio la amo ne

estas kaj ne povas esti en kontraŭdiro kun la vero kaj kun la justeco. Dio ne havas nur unu atributon kaj la homo ne havas rajton intrige manipuli unu el ili kontraŭ la aliaj: la absolutan amon kontraŭ la absoluta vero kaj absoluta justeco!

Ni ne estas la unuaj, kiuj starigas tiun ĉi decidan demandon. Jam en la tempo de Jesuo Kristo sur nia tero troviĝis homoj, kiuj volis de li mem scii, kiamaniere oni povus postsekvi lin. Unu el tiuj estis la „riĉa junulo”. Li demandis Jesuon: „*Majstro, kian bonon mi faru, por ke mi ricevu la eternan vivon?*” (Mat 19, 16). Jesuo, surprize, unue refutas la uzitan nocion pri „la bono”, dirante, ke nur Dio estas bona. Tio estas pli grava ol la eklezioj (falsaj) opinias kaj eksplikas. Per tio Jesuo diras, ke la homo el si mem ne kapablas fari ion ajn bonan. Tamen Jesuo, ĉar ironie, nombras al la demandinto la leĝojn de Moseo – kaj la junulo tion ne rimarkas kaj facilanime respondas, ke li ĉion-ĉi jam plenumas. Ĉu vere? En iu alia biblia teksto ni povas informiĝi, ke nek unu sola homo krom Jesuo vere plenumis la leĝon: „*Ne ekzistas justulo, ne eĉ unu ... ekzistas neniu, kiu faras bonon, eĉ ne unu*” (Rom 3, 11-12). La fabelo pri la t.n. „bona homo” restas fabelo de Rousseau kaj de falsaj pseŭdokristanaj eklezioj. Por puŝi la junulon, kiu tiel mensoge respondis, al la vando, Jesuo starigas al li radikalan postulon por enketi, ĉu tiu vere estas tiom perfekta: „*Se vi deziras esti perfekta, iru, vendu viajn posedaĵojn, kaj donu al malriĉuloj, kaj vi havos trezoron en la ĉielo; kaj venu kaj sekvu min*” (Mat 19, 21). Kutime oni misuzas ĝuste tiun ĉi eldiron por demonstri, kiel relative oni devas kompreni la Biblion kaj diskvalifiki tiujn, kiuj prenas la Biblion por vera vorto de Dio ekstremradikalaj fundamentalistoj. Efektive Jesuo ne estis socia utopiisto, kiu kredus, ke la homa socio povus ekzisti, se liaj postsekvantoj vere ĉion vendus kaj donus la sumon al la malriĉuloj. Tio signifus, ke nur idoloj havu rajton mastrumi ekonomiajn entreprenojn. Sed ne temas pri tio. Jesuo volis nur kontroli, kiom konsekvencaj estas la intencoj kaj vortoj de la demandinta junulo. Se tiu vere plenumus la tutan leĝon, kiel li fanfaronis, la postulo de Jesuo lin ne povus ĉagrenigi kaj li tre facile adiaŭus de siaj havaĵoj. Sed tiuj falsaj kaj relativigaj eksplikistoj tute forgesas pri la lastaj vortoj: *kaj sekvu min!*

Ĉu oni povas postsekvi Jesuon Kriston, kiel oni postsekvus homojn, kiuj gvidas politikajn partiojn, armeojn, ideologiajn doktrinojn, ekleziojn, filozofiajn instruojn ktp.? Ĉiuj nomitaj ekzemploj postulas de la unuopulo eksteran obeon, sed ne zorgas multe pri la interna stato de la homo. Oni povis ekzemple obee sekvi la instruon kaj politikan agadon de Adolfo Hitler kaj tamen interne priridi lian rasisman kaj kontraŭjudan instruon kaj sintenon. Multaj tion faris – post la malvenko de la sistemo eĉ pli multaj pri tio fanfaronis. Oni povis centprocente sekvi la linion de iu komunista partio kaj plenumi ĉiujn decidojn de ĝia politburoo kaj ĝenerala sekretario kaj tamen en sia interno ridi pri la socia utopio de la komunisma ideo. Multaj tion faris – post la malvenko de la sistemo eĉ pli multaj pri tio fanfaronis. Estroj de la homaj movadoj, skoloj kaj entreprenoj postulas la eksteran obeon kaj disciplinon, eĉ se ili pervorte aspiras ankaŭ la homan koron kaj menson. Tial en tiuj sistemoj ĉiam floris kaj abundis la malsincero, la teatrumado, la blufado. Kiel cetere kompreni, ke post la falo de komunismo en Slovenio la partio, kiu nombris proksimume 100.000 da adeptoj, kvankam neniam post la politika ŝanĝo malpermesita aŭ persekutita, tuj poste ŝanĝis sian nomon, simbolojn kaj koloron de sia standardo, por baldaŭ tute malaperi el la politika scenejo. Nun oni tre malfacile trovas en Slovenio homon, kiu sin publike proklamas komunisto. La iam tiel fortan politikan strukturon konsistigis centmil da blufaj personoj, kies koroj kaj mensoj ne sekvis tion, kion instruis kaj postulis la centra komitato. La samon oni povas vidi eĉ ĉe la pseŭdokristanaj eklezioj. Milionoj kaj centmilionoj sen granda problemo ŝanĝas siajn starpunktojn, se iliaj ekleziaj estroj ilin ŝanĝas. Ankaŭ tiuj institucioj postulas de siaj adeptoj nur eksteran obeon kaj disciplinon, sed ne la aŭtentan internan akordon de la koro kaj de la menso. Kiam mi pasintjare forlasis la romkatolikan eklezion, en kiu mi havis bonan laborpostenon, kelkaj katolikoj, eĉ sacerdotoj, proponis al mi: Kial vi komplikas vian vivon; vi povas en via interno

kredi, kiel vi volas; gravas, ke vi ne rompu la sistemdisciplinon de ekstere! Neniu el ili demandis min pri la destino de mia animo post mia morto, en plej bona okazo ili zorgiĝis, kio okazos per miaj financoj kaj kia estos mia pensiĝo...

Sed la plej gravan kaj klaran instrukcion de Jesuo Kristo, kiamaniere oni povas veni en la Regnon de Dio, Jesuo eldiris al la tre klera fariseo Nikodemo. Estas la sama Nikodemo, kiu dum la proceso singarde, sed tamen ne senriske provis interveni favore al Jesuo, kaj post lia morto prizorgis la enterigon. Li ne demandas tiel rekte, ni aŭdis, tre singarda homo, kiel rekte Jesuo tamen respondis. Li diris: „*Rabeno, ni scias, ke vi estas instruisto, veninta de Dio; ĉar neniu povas fari tiajn signojn, kiujn vi faras, se Dio ne estas kun li*” (Joh 3, 2). Tio laŭforme tute ne estis demando, sed konstato. Sed nia Sinjoro vidas en ĉies koron kaj li legis tie la demandon, kiamaniere trovi la vojon al Dio, kaj respondis: „*Vere, vere, mi diras al vi: Se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio*” (Joh 3, 3). Ĉi tie ni haltu. Estas iom danĝera frazo niatempe, kiam en la okcidenta mondo enmodiĝis kredi je reenkarigiĝo, kaj supraĵaj animoj, ĉe kiuj deziro patras la rezulton, en sia hasto jam vidas konfirmon de sia kredo, veninta el Hindio, ke la homa animo post la morto de la korpo, elektas por si novan korpon kaj naskiĝas denove en iu alia jarcento kaj foje en alia kontinento por tiel iom post iom perfektigi sian staton por finfine, atingonte la perfektecon, unuiĝi kun la tutuniversa diaĵo, ekzemple Brahmao. Al ili ŝajnas, ricevi tian konfirmon rekte el la buŝo de Kristo, fascina afero. Sed ĉi tie ne temas unuarange pri la demando, ĉu Jesuo pensis pri tiu tipo de denova naskiĝo, tion ni tuj poste kontrolos en la kontinuo de la dialogo inter Jesuo kaj Nikodemo; unuarange temas pri unu el plej gravaj teologiaj dilemoj, kies konsekvenco estis ankaŭ la reformacio en la 16-a jarcento, kiun la romkatolikoj prenas por skismo: Ĉu Dio vere postulas de la homo perfektigon en la mondo kiel kondiĉo por la enirpermeso en la ĉielon? Kaj: ĉu tia perfektigo principe eblas?

Tipe por la paganaj instruoj estas la imago, ke la homo povas sin sur la ŝtuparo de la perfektigo savi mem. En tiu ĉi punkto ili sekvas la saman eraron en la tuta gamo de Babilono ĝis Romo aŭ Konstantinoplo. Ĉu ne estis la falsa imago per zigurato atingi la ĉielon esence la sama ideo, kiel ĉe hinduistoj per jogaa askezo kaj reenkarigiĝa perfektigado atingi Brahmaon aŭ similm metode ĉe budhistoj atingi nirvanon, kiel ĉe ortodoksistoj per ĝusta liturgio kaj ikonadorado, se temas pri elito ankaŭ per sufiĉe profunda mistiko – aŭ ĉe romkatolikoj per liturgio, sakramentoj, morala perfektigo kaj karitata engaĝiĝo, denove se temas pri elito, per profunda mistiko, atingi Dian regnon; kiel ĉe komunistoj, kiuj fakte, kiel la franca filozofo kaj teologo Maritain prave konstatis, estis la lasta herezo de la kristana kredo, per revolucia sindono kaj askezo kaj ĝusta „sciencia mondpercepto”, prenita el kelkaj malmultekostaj propagandbroŝuroj, ja la ĉefverkojn de la komunismo apenaŭ iu vere legis, atingi la t.n. senklasan socion, kio en la komunisma ĵargono egalas al homa imago pri paradizo? Je kiu prezo niaj islamaj proksimuloj provas invadi la ĉielon, ni povas legi en nia ĉiutaga gazetaro kaj en konsterno spekti sur niaj ekranoj. Ĝis la postrestinta animisma religio, kies liturgion kaj metodojn oni povas observi ĉiun 1-an de novembro, kiam oni subpretekste de „ĉiuj sanktuloj” fakte praktikas kulton de la mortintoj kaj en la senco de spiritismo provas starigi almenaŭ emocian kontakton kun la animoj en la transcenda mondo, etendas sin la sama baza kaj baze falsa imago kaj ideo, ke oni povas per propra home disponebla kapablo atingi la ĉielon. Tio jen estas la vojo de la religioj. De ĉiuj. Tial pravas Marx per sia tezo, transprenita de Feuerbach, ke religio estas la opio de la popolo. Ĝi promesas savon, sed kaŭzas nur narkotiĝon.

Por montri la alternativon, kiu baldaŭ montriĝos la nure saviga vojo, mi atentigu al la persono, vivinta kaj mortinta en la erao de Jesuo Kristo sur la tero, kies proksimon verŝajne neniu al ni dezirus. Temas pri la rabisto, kiun la romaj aŭtoritatoj mortkondamnis pro liaj krimfaroj kaj

krucumis lin samtempe kun Jesuo je lia dekstra flanko. La rabisto dekstre refutis la blasfemadon de sia samsortano maldekstre kaj diris: „*Ĉu vi eĉ ne timas Dion? ĉar vi estas en la sama kondamno. Kaj ni ja juste, ĉar ni ricevas rekompencan, merititan pro niaj faroj; sed ĉi tiu faris nenion malbonan*” (Luk 23, 40). Poste li daŭrigas: „*Jesuo, memoru min, kiam vi venos en vian regnon*” (Luk 23, 42). Jen la respondo de Jesuo: „*Vere mi diras al vi: Hodiaŭ vi estos kun mi en Paradizo*” (Luk 23, 43). Ni analizu, kio okazis. La dekstra rabisto ne estis pli bona homo ol la maldekstra. Tio, kio lin distingis disde la maldekstra, ne estas aparteno al iu ajn eklezio aŭ religia komunumo; li ricevis nek unu el la t.n. sakramentoj; li neniam partoprenis liturgion, kiun la falsaj eklezioj nomas meso. Li ne pilgrimis, ne agis karitate, ne adoris ikonojn, eĉ ne preĝis, ne fastis, ne zorgis pri sia morala sinteno kaj konduto; lia tuta mistiko elĉerpiĝis en la demando, kiamaniere en malhelo malfermi la pordon de la prirabota domo, por ne esti registrita kaj malhelpita en sia specialekonomia faro. Nenion li praktikis, kion la religioj de la mondo prenas por nepra praktiko atingi savon. Li faris nur du aferojn kaj per ili li atingis la savon, do ni povas ilin preni por esencaj: li konfesis al Dio siajn pekojn – kaj li esprimis ne nur deziron esti konsiderita, kiam Jesuo troviĝos en sia Regno, sed ankaŭ fidon, ke Jesuo havas povon tion aranĝi. Li rekonis Jesuon Kristo, esti la Sinjoro kaj la Savanto. Konscia katoliko devus protesti: Pardonu, Sinjoro, mi kun miro akceptas, ke vi la rabiston proklamis savita, sed kie estas la purgatorio? Unue purigado de lia pekinta animo en la purgatorio, kie multaj preĝoj kaj ofermesoj povus lian purigsuferon mildigi kaj malplilongigi, nur post tio li povus aperi en via societo en la Regno de via Patro... Nu, Jesuo neniam estis katoliko en la roma ekspliko, ja Romo lin kondamnis kaj krucumis, do li ignoris teologiajn problemojn de Romo kaj montris al ĉiuj generacioj, kiamaniere oni atingas la eternan vivon. Li certe ne volis per tio propagandi la profesion de rabistoj, li volis per tiel drasta maniero montri, ke eĉ rabisto povas senprobleme kaj senprokraste tuj fariĝi la heredanto de la Regno, se unu nura kondiĉo estas plenumita. Kiu estas la kondiĉo? Unu formulon de ĝi ni jam legis en 3-a ĉapitro de la evangelio laŭ Johano: naskiĝi denove. Sed ni ne scias jam precize, kion tio signifas. Do ni serĉu aliajn formulojn. En la letero de la apostolo Paŭlo al Romanoj 3, 28 ni povas trovi jenon: „*Ni do konkludas, ke homo praviĝas per fido, ekster la faroj de la leĝo.*” Ne sufiĉas..., do ni serĉu plu: „*Ĉar per graco vi saviĝis per fido; ne per vi mem: ĝi estas dono de Dio; ne el faroj, por ke neniu fanfaronu*” (Efs 2, 8.9). Aŭ de la sama apostolo en Romanoj 10, 9: „*Ĉar se vi per via buŝo konfesas Jesuon Sinjoro, kaj kredas en via koro, ke Dio lin levis el la mortintoj, vi saviĝos.*” Ĝuste tion kredis kaj eldiris la savita rabisto. Al tiuj, kiuj opinias, ke la homo ankaŭ alimaniere povas atingi savon, la Biblio klare diras: „*Kaj en neniu alia estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo, donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj*” (Agoj 4, 12). Do neniu savo helpe de Brahmao, de Budho, de Alaĥo, de iu ajn granda spirito, de pozitivaj energioj en la kosmo, de eklezioj kaj iliaj ritoj, sakramentoj kaj aliaj devotaj agoj – sed sole per Jesuo Kristo. Tion rekoninte Marteno Luther formulis siajn kvar latinlingvajn „sola” resp. „solus” kun la sama signifo kiel „sola” aŭ „nura” en Esperanto:

- *Sola scriptura* (nur la Biblio) – ne ankaŭ ia tradicio, aŭtoritatoj, doktrino, dogmoj;
- *Sola fide* (nur la fido) – ne ankaŭ filozofio, teologio, liturgio, pilgrimado ktp.;
- *Sola gratia* (nur la graco) – ne ankaŭ „bonaj faroj” kiel provo sin deaĉeti, pravigi;
- *Solus Christus* (nur Kristo) – ne ankaŭ la patrino de Jesuo, „sanktuloj”, anĝeloj ktp.

Sed ni ne scias nur, legante el la Skribo, kiamaniere ni nure povas esti savitaj, do nure per Jesuo Kristo kaj fido en lin; ni povas el la sama fonto klare ekscii ankaŭ, pro kio nur la fido en Jesuon nin povas savi – kaj eĉ, ĉu ni efektive jam estas savitaj. Ne estas tiel, kiel instruas la falsaj eklezioj, ke oni akirus sian savon nur post sia morto, ja la savo okazas tuj, jam surtere, eĉ se ni dum nia surtera vivo ne povas tuj ĝui ĉiujn fruktojn de la savo en pleno kaj perfekto. En la jam menciita 3-a ĉapitro de la evangelio laŭ Johano ni povas legi la plej optimisman kaj feliĉigan por ni mesaĝon, kiun iam ajn iu homo povis legi: „*Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li, ne pereu, sed havu eternan vivon*”

(Joh 3, 16). La amo de Dio al la homoj estas la kialo de nia ŝanco akiri savon. Al la demando, pro kio tio estas ebla nur pere de Jesuo kaj ne pere de aliaj vojoj, kiujn instruas la religioj kaj filozofioj de la mondo, ni rigardu la versiklojn 7-9 en la Psalmo numero 49: „*Fraton tute ne liberigos homo, nek donos al Dio elaĉeton por li. Multekosta estus la elaĉeto de ilia animo, kaj neniam tio estos, ke li restu viva eterne, ke li ne vidu la tombon.*” – La peko de Adamo kaj de ĉiu lia posteulo malŝparis pli ol la virto de la homo povas ŝpari... Ni ne havas eblecon per niaj „bonaj faroj” deaĉeti nin antaŭ Dio. Ni legas: „*Ĉar la salajro de peko estas morto; sed la donaco de Dio estas eterna vivo en Kristo Jesuo, nia Sinjoro*” (Rom 6, 23). La savo do ne povas esti perlaborita, meritita, kiel false instruas la religioj, ĝi povas esti nur grace donacita de Dio, ĉar Jesuo Kristo estas, „... *kiu donis sin por ni, por elaĉeti nin el ĉia maljusteco kaj por purigi al si popolon propran fervoran pri bonaj faroj*” (Tit 2, 14). Tre gravas ĉi tie la fraza konstruo, ĝia vortordo. Unue la elaĉeto fare de Kristo, poste fervoro pri bonaj faroj de lia elaĉetita popolo – kaj ne inverse, kiel mensogas multaj teologoj. Luther tion tre pregnantе formulis: „La falsaj kristanoj faras bonajn farojn por iĝi savitaj – veraj kristanoj faras bonajn farojn, ĉar ili estas savitaj!” Sed el la Skribo ni povas legi ankaŭ la orientigan certigon, ĉu ni estas savitaj aŭ ne. Jen la certigo: „*Ĉi tion mi skribis al vi, por ke vi sciu, ke vi havas vivon eternan; al vi, kiuj kredas al la nomo de la Filo de Dio*” (1Joh 5, 13). La vera kristano ne estas kondamnita ĝis sia surtera morto vivi en necerteco pri sia eterna vivo, kiel la religianoj tio estas. Se li kredas al la nomo de la Filo – cetere li ne povas esti prenata por kristano – do li per certeco scias, ke li estas infano de Dio, ke li jam heredis sian civitanecon en la Regno de Dio, ĉar li per sia fido jam naskiĝis denove. La saman konfirmon ni povas legi en la evangelio laŭ Johano 1, 12: „*Sed al ĉiuj, kiuj lin (Jesuo) akceptis, li donis la rajton fariĝi filoj de Dio, al la kredantoj al lia nomo, kiuj naskiĝis nek el sango, nek el volo de karno, nek el volo de homo, sed el Dio.*” Aŭ aliloke: „*Jesuo faris antaŭ la disĉiploj multajn aliajn signojn, kiuj ne estas skribitaj en ĉi tiu libro; sed ĉi tiuj estas skribitaj, por ke vi kredu, ke Jesuo estas la Kristo, la Filo de Dio, kaj ke kredante, vi havu vivon en lia nomo*” (Joh 20, 30-31).

Nun ni povas reveni al la sceno de la interparolo de la fariseo Nikodemo kaj Jesuo en la 3-a ĉapitro de la evangelio laŭ Johano. Jesuo responde al la skeptiko de Nikodemo ankoraŭfoje substrekas, por ke ne estu dubo, ĝis niaj tagoj, eĉ se moderna teologio tion ne plu instruas, sed kontestas: „*Vere, vere, mi diras al vi: Se homo ne estas naskita el akvo kaj la Spirito, li ne povas eniri en la regnon de Dio*” (Joh 3, 5). Tiel li por ĉiam nuligas la spekulacion, ke subkondiĉe povus temi pri la reenkarigi laŭ la religiaj instruoj el Hindio. Tamen: Kio estas, naskiĝi el akvo kaj Spirito? Ĉu temas pri akvo de la greka filozofo Tales, kiu en ĝi vidis la praelementon de ĉio ekzistanta en la kosmo? Ni malfermu en la letero de Jakobo: „*Laŭ Sia propra volo Li naskis nin per la vorto de la vero, por ke ni estu kvazaŭ unuaaĵo de Liaj kreitaĵoj*” (Jak 1, 18). Ni malfermu ankaŭ en la unua letero de Petro, v. 23: „... *renaskite, ne el nepereema, per la vorto de Dio, vivanta kaj restanta.*” Nun ni scias: ne temas pri la akvo el greka kosmologio, temas pri la akvo, kiu en la Skribo havas du signifojn. Foje ĝi estas unu el la nomoj de la Sankta Spirito (kiel ankaŭ: vento, fajro, konsolanto, instruisto...), foje ĝi signifas la Vorton de Dio, do simple la Biblion. Ke ne estu pleonasmo, en la vortoj de Jesuo naskiĝi el akvo kaj Spirito signifas: naskiĝi el la Vorto de Dio kaj la Spirito, kiu la Vorton eksplikas kaj en ni komprenigas. Nun la cirklo fermiĝas: laŭ la vortoj de Jesuo kaj liaj apostoloj la homo povas esti savita nur, vere ekskluzive, per la fido en Jesuo Kriston. Sed de kie venas la fido en la homon? En la letero al Romanoj de la apostolo Paŭlo ni povas informiĝi pri tio ĉi: „*La fido venas do per aŭdado, kaj aŭdado per la vorto de Kristo*” (Rom 10, 17). Tial esti savita per la fido kaj povi eniri en la regnon de Dio per novnaskiĝo el akvo kaj Spirito estas la sama afero. La fidon ni povas ricevi nur el la novnaskiĝo el akvo kaj Spirito – kaj tio en la praktika vivo signifas: el la konatiĝo per la Dia vorto, la Biblio!

Dum nia tuta okupiĝo pri la demando, kio faras veran kristanon, ni demandis en la tekstoj de la Biblio. Kial? Ĉu ĝi estas io pli ol literature kaj lingve, eble eĉ historie tre interesa antikva libro? Kiun ni demandu? Se ni demandos la nekredantan mondon aŭ la kvazaŭkredantajn modernajn teologojn kaj sacerdotojn, ili diros al ni, ke sendube temas pri interesa libro, enhavanta onuopajn bonajn konsilojn por nia vivo. Se ili prenas la Biblion por senerara kaj plene vera vorto de Dio, kvankam teknike skribita per homaj manoj kaj instrumentoj sur la home prilaborita pergamento aŭ papiruso, religioj kaj ŝtate ligitaj kaj rekonitaj eklezioj neniam ekzistis kaj ŝercoj pri apostola sukceso kaj aliaj herezaĵoj neniam troviĝus. Tiam ni havus nur la veran Eklezion, fonditan de Jesuo Kristo, kiu estas ĝia nura kaj vera kapo kaj fundamenta roko, unueca kaj nerenversebla en li, eĉ se surtere aperanta sub diversaj organizaj formoj kaj nomoj. Kiun do ni demandu? Ni ne havas pli altan instancon ol la aŭtoron de la Skribo mem, en la persono de ĝia eksplikado, la Sanktan Spiriton. Ĉiuj aliaj, se dirante ion alian ol diras la Skribo, ĉu mensogas ĉu eraras. La opinio de la Sankta Spirito pri la Biblio estas skribita en la Biblio mem. En la 2-a letero al Timoteo 3, 16 de Paŭlo ni ekscias: „*Ĉiu skribaĵo estas inspirita de Dio.*” Aŭ: „*Ĉar ĉio, kio estas antaŭe skribita, estas skribita por nia instruado, por ke per pacienco kaj per konsolo de la Skriboj ni havu esperon*” (Rom 15, 4). Aŭ plue: „*Antaŭ ĉio sciu, ke neniu profetaĵo de la Skribo enhavas en si sian propran klarigon. Ĉar neniam profetaĵo estas alportita per homa volo; sed homoj, movataj de la Sankta Spirito, parolis laŭ Dio*” (2Pet 1, 20-21). Por tiuj, kiuj falsifas, troviĝas du admonoj: „*Ne aldonu al tio, kion mi ordonas al vi, kaj ne deprenu de ĝi; sed observu la ordonojn de la Eternulo, via Dio, kiujn mi ordonas al vi*” (5Mos 4, 2). Kaj fine de la Sankta Skribo: „*Mi atestas al ĉiu, kiu aŭdas la vortojn de la profetaĵo de ĉi tiu libro: Se iu aldonos al ili, Dio aldonos al li la plagojn, skribitajn en ĉi tiu libro; kaj se iu forprenos el la vortoj de la libro de ĉi tiu profetaĵo, skribitaj en ĉi tiu libro, Dio forprenos lian lotaĵon el la arbo de vivo kaj el la sankta urbo*” (Apk 22, 18-19).

La eksterbiblian konfirmon por la vereco de la Biblio oni povas akiri nur tiel, ke oni ĝin elprovas per sia vivo, direktita de ĝi. Dio ne postulas de la homo blindan kredon, Li inspiris sian Skribon tiel, ke oni povas ĝin esplori kaj enketi en la vivo. En la historio de medicino multaj kuraĝaj kuracistoj infektiĝis kaj eĉ mortis, elprovante sian novan medikamenton unue per sia propra korpo. Tian riskon homo, kiu sincere serĉas Dion kaj tiucele estas preta esplori kaj elprovi Lian Vorton, ne havas. Ĝuste kontraŭe – tiu per certeco akiros la eternan vivon. Kontraŭe, tiuj, kiuj volas unue elprovi ĉiujn eblajn instruojn kaj saĝaĵojn de la mondo, eniras riskon de la eterna morto.

Finfine ni povas difini la veran kristanon sub la lupeo de la Biblio. Al tiu tre malgranda aro da homoj apartenas tiu, kiu sian menson, sian koron kaj sian ceteran vivon senrezerve disponigis al Jesuo Kristo por fariĝi en li „nova kreitaĵo”, kiel diras Paŭlo en sia 2-a letero al Korintanoj 5, 17. Tio estas la homo, kiu el la graco de la ekkono kaj el sia libera volo konfesas al Dio sian pekan vivon, petante pardonon por la pekoj kaj alprenante la fidon en Jesuon Kriston kiel la solan Savanton kaj Peranton inter Dio kaj homo. Tiu, kiu tiamaniere akiris la pardonon de siaj pekoj kaj fidon en sian Savanton, alprenas ankaŭ bapton por tiel plenumi la volon de Dio kaj atesti antaŭ homoj sian fidon. La bapto ne estas la nepra kondiĉo por fariĝi Dia infano, do por esti savita, sed tiu, kiu akiris savon, ne havas plu motivon ne alpreni la bapton en la nomo de la Patro, de la Filo kaj de la Sankta Spirito. La bapto ne kaŭzas en la homo la pardonon kaj ellavon de la pekoj, sed ĝin postsekvas kiel atesto; la bapto ne kaŭzas la novnaskiĝon, sed ĝin postsekvas kaj atestas. Tiel la rito, malprave nomita „bapto”, aranĝita en falsaj eklezioj ĉe la beboj, havas neniun sencon kaj ne estas vera bapto. Tial ankaŭ Jesuo baptis neniun infanon, li ilin invitis al si, eĉ starigis ilin kiel modelon por la plenkreskuloj kaj ilin benis – sed ne baptis! La vera kristano estas homo, havanta personan rilaton al Jesuo Kristo, ĵetanta ĉiujn siajn zorgojn sur lin. Ĉar infano de Dio, li ne plu estas la sklavo de la peko kaj tiel same ne la



sklavo de tiu ĉi mondo. Li vivas en la mondo kiel salo kaj fermento, sed ne apartenas al ĝi; lia/ŝia vera patrujo estas la Dia regno, kies civitano li fariĝis per sia konvertiĝo.

Vera kristaneco de la kristano ne troviĝas nur en nevidebla persona rilato inter tia homo kaj lia Savanto Kristo, sed ĝi manifestiĝas ankaŭ en la ekstera, videbla ĉiutaga vivo. Oni rekonas veran kristanon ankaŭ sen lia memprezento, memdifino esti kristano. La valorgamo de vera kristano estas en plej multaj okazoj ĝuste la kontraŭo de tio, kion la mondo prenas por valora. Unu el plej karakterizaj trajtoj de vera kristano estas, servadon al aliaj pli alte taksi ol la mastradon super la aliaj. Vera kristano prenas sin por malpli grava ol la aliaj homoj estas; li prenas sin por malpli saĝa ol aliaj pri si pensas; malpli morala ol la aliaj validas aŭ pretendas validi. Laŭ la vortoj de la apostolo Paŭlo la vera kristano fieras pri nenio alia kaj speciale pri nenio propra, krom pri Kristo. La vera kristano konas tre precize la valoron de la oro, se ĝi simbolu la trezoron de la mondo – nome, ke ĝi valoras en la perspektivo de la Dia regno precize nenion. Same pri ĉio alia, kio brilas aŭ eĉ nur pretendas aŭ opinias brili en la mondo: socia klaso, beleco, riĉeco, spriteco, allogo, sporta, profita, profesia aŭ amaskomunika ĉampioneco, akademia grado, nobelula rango kaj titolo, socia kaj politika povo, seksuala apelo kaj ĉio alia, per kio oni povas momente surtere brili. La vera kristano ne konas timojn kaj zorgojn. Tio ne signifas, ke oni kiel kristano estu senrespondeca kaj senatenta – sed la vera kristano scias, kiu finfine kontrolas kaj difinas ĉion. Tial la vera kristano ne panikas pri atombomba danĝero, nek pri medidetrua evoluo, nek pri la morala dekadento de la homaro. La vera kristano scias, ne pro sia propra saĝo aŭ klereco, sed el la Dia vorto, kia estas la iro de la mondo kaj ĝia historia perspektivo kaj ne havas plu motivon paniki, kiel tion faras la cetera mondo. La vera kristano ignoras la timojn kaj zorgojn, sed ne la suferojn de siaj proksimuloj, senrigarde, ĉu tio estas liaj gefratoj, do la novnaskitaj homoj, aŭ eĉ liaj malamikoj – kaj fakte ĉiuj malamikoj de Dio, kaj tio estas ĉiuj nekonvertiĝintaj homoj, do la granda plimulto de la homaro, nepre estas ankaŭ liaj malamikoj, kiujn li tamen, ĉar kristano, amas kaj laŭ eblecoj helpas. Tamen la vera kristano ne gratas falsan ideon savi la mondon de ĝiaj plagoj kaj investisian vivon kaj energiojn por sociaj utopioj, kiuj neniam en la historio alportis ion pli bonan ol jam la origina plago estis.

Sed super ĉio estas tio, kion nia Sinjoro mem starigis kiel signon por esti liaj disĉiploj: „*Se vi restos en mia vorto, vi estas vere miaj disĉiploj*” (Joh 8, 31) kaj: „*Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia*” (Joh 13, 35). Do, ne nur esti denovenaskita el la akvo de Dia Vorto kaj Spirito, sed daŭre vivi en kaj el tiu Vorto kaj Spirito. Kaj pinte de ĉio-ĉi: havi reciprokan amon. Ne homan simpatian, ne erotikon, eĉ malpli seksualan pasion, sed veran amon. Amen.

---

Dirite dum la 7-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Mariburgo (Slovenio), 2-an de aŭgusto 2007.